



NORDHUNGARIA INFORMO

**Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc**

Majo - Junio 2009

4. évfolyam 44 - 45. szám

La miraklo	3
La miraklo	4
Miklós Radnóti /1909 – 1944/	5
Kiel mi sciis	6
Letero al la edzino	7
Ni funebras	8
Forpasis Sylla Chaves	8
La ĝojplena plendo	9
LA AVAŜ - MONTA REFORMATATA PREĜEJO.....	10
HISTORIO DE LA PREĜEJO EN LA 19 – 20. JARCENTOJ.....	10
LA TERTREMO -.PROTESTANTOJ DUM LA PUBLIKA KUNVENO.....	10
ŜERCO.....	16
Informoj.....	17
„IKU EN BĴALISTOKO: KREMO EL 30 PROPONOJ”	17
"UEA viva".....	19
Betty Chatterjee	19
SCIENCAĴOJ.....	21
C. R. Darwin /1809-1882/	21
Trafa respondo.....	22
La pereiga vaporo.....	22
DEMENCIO DE LA MALSATA CERBO	23
Dua Renkontig'o.....	25
ILEI - KONFERENCO - AMBAŬ: AMUZO KAJ SCIENCO!	25
Informoj pri la printempa kaj someraj sesioj de la nova ekzamensistemo de UEA.....	26
Ni funebras	26
TEMUĜINO, LA FILO DE LA STEPO.....	28



La miraklo

Karaj niaj legantoj!

Vi scias certe, kiome multfoje ni diras mirrevante; ke ĉi-tiu aŭ tiu afero estas vera miraklo! Ankaŭ tion ni kutimas diri: „miraklo estas, ke ni vivas spite al la cirkonstancoj!” Sed, vere mirakloj estas ĉiuj majstroverkoj de la tutmonda vivularo, miraklo estas nia sana infano kaj ni povas paroli pri similaj. Sed vi pripensu bone: tre-tre granda miraklo estas ankaŭ tiu japana urbo Hirosima, – kiu estis atombombita la 6an de aŭgusto en 1945 – ĉar kontraŭ tio ke ĝia 400 000 ana loĝantaro tute pereigis, cindriĝis ties tuta teritorio escepte unu kupolan domon, – nun denove vivas tie homoj, kaj nun jam la tuta urbo rekonstruita estas. Hirosima estas nun la urbo de monumentoj de la viktimoj de la kontraŭ ĝi okazinta atombombatako, kiel ni povas sciiĝi el la: Gvidlibro Pri la Urbo de Monumentoj, nome: Vojaĝo en Hirosima, kaj en 2006 eldonita libreto de la Esperanto Centro de Hirosima. Ni primemoras tiun teruran eventon, kiu estas honto de la unu kontraŭ alia batalanta homaro. La donace, - en majo de 2009a - ricevitan belan eldonajon, ni dankas al la estraro de Esperanto Centro de Hirosima.

Kiam foje mi parolis pri iu miraklo, mia saĝa altaĝa esperanto instruisto: D-ro Ludoviko Gyóry Nagy, la sinjoro advokato tion diris: „Ja, mirakloj tute ne ekzistas. Kiel miraklon ni povas ekvivi la neatenditajn agrablajn eventojn, okazintaĵojn, estiĝantajn pro efiko de bonaj agoj. La mirakloj povas deveni el niaj siecoj, el la ankoraŭ nekonataj niaj proprecoj.”

Nun, ni prezentos tiun iun miraklon, kiu loĝas en la homa animo, kiu aperis por tiuj kiuj tre esperis ĝin, kaj tiu aperis ĝuste en la plej konvena momento.

Adri Pásztor



La miraklo

„La knabineto iris en sian ĉambron kaj el sia ŝranko elprenis iun marmeradan butelon. Ŝi elverŝis la en botelo estantajn monerojn kaj zorgeme ekkalkulis tiujn. Eĉ trifoje kalkulis tiujn, ĉar la sumo devis esti tre preciza. Ŝi ne volis erari. Poste singarde remetis la monerojn en la botelon kaj fermis tiun kaj elŝteliĝis trans la malantaŭa pordo. Ŝi iris en tiun apotekon, kiu estis de ilia loĝejo en la sesa dombloko. Super pordo de la apoteko videblis bildo de la granda ruĝa Indiana triboĉefo. Ŝi atendis pacience la apotekiston por atenti ŝin iomete, sed la apotekisto estis okupita. Tess/Teŝŝ/, la knabineto iris pland-ŝove. Nenio okazis. Ŝi raspis la gorĝon malagrabla, sed ankaŭ tio ne havis sukceson. Fine ŝi elprenis iun moneron el la butelo kaj frapadis vitron de la vendostablo. Efike de tio aperis la apotekisto. – Kion vi petus? – demandis la apotekisto kolere. – Ĝuste nun mi parolas kun mia frato, kiun mi vidis delonge. – aldonis la apotekisto, tiel ŝajnis, ke ne atendas respondon.

- Sed mi dezirus paroli pri mia frato – diris Tess, same kolere.- Mia pli juna frato estas malsana kaj aĉetus por li iun miraklon.
- Ĉu? – turnis sin al ŝi la apotekisto.
- Lia nomo estas Andreo kaj iu malbela afero evoluas en sia kapo kaj mia Paĉjo diris, ke iu miraklo povas savi lin. Bonvolu diri, kiom kostas iu miraklo?
- Kara knabineto, ni ne vendas miraklojn....bedaŭrinde, mi ne povas helpi vin – respondis la apotekisto mildante.
- Atentu, mi havas monon, mi povas pagi. Se estas bezonata, mi povas kompletigi tiun. Diru, kiom kostas.

Frato de apotekisto, kun kiu li paroladis, estis bone vestita viro. Li kliniĝis al la knabino kaj demandis ŝin:

- Diru, kia miraklo estas bezonata por via pli juna frateto?
- Tion mi ne scias – repondis Tess larmante – sed mi scias, ke li estas tre malsana kaj laŭ Panjo estas bezonata por li iu operacio. Paĉjo ne kapablas pagi, pro tio mi deziras transdoni mian monon.
- Kiom da mono vi havas? – demandis la viro de Ĉikago.
- Unu dolaro kaj dekunu cendoj – respondis Tess apenaŭ aŭdante – ĉi tio estas ĉio, sed mi povas akiri ankaŭ pli multon.
- Ho, tio ĉi estas admirinda hazardo! – ridetis la viro. – unu dolaro kaj dekunu cendoj – ĝuste estas tiu preciza sumo, kiu estas kosto de miraklo de iu knabeto.

Li metis la monon en iun manon, lia alia mano prenis manon de la knabineto:

- Konduku min hejmen al vi, ĉar mi dezirus vidi vian pli junan fraton kaj viajn gepatrojn. Eblas, ke mi havas tiun miraklon, kiun vi dezirus ricevi.

La bonvestita viro estis D-ro Carlton Armstrong, kirurgo, kiu estis specialisto de la nervokirurgio. Li senpage faris la operacion kaj ne delonge Andreo denove estis hejme sendirekte kaj sane.

Panjo kaj Paĉjo parolis feliĉe pri tiu okazintaĵaro, kiu rezultigis tion ĉi.

- Ĉi tiu operacio estis iu efektiva miraklo – flustradis Panjo – kiom kostintus tio?

Tess ridetis. Li sciis precize, kiom kostis la miraklo. Ĝia kosto: unu dolaro kaj dekunu cendoj, pluse senĉesa kredo de iu infano. Iu miraklo dependas ne de la leĝoj de la naturo, sed de la funkciado de la pli altaj leĝoj.”



/Sendajon de d-rino Ilona Bikszády, esperantigis László Pásztor/

Miklós Radnóti /1909 – 1944/

Ni memoras nun pri la 100-jara datreveno de naskiĝo de la elstara hungara poeto.

Miklós Radnóti – kiel poeto, arttradukisto – elstara figuro estis de la hungara antifaŝista liro. Li naskiĝis en burĝona familio en Budapeŝto. La gepatrojn pro ilia morto, li frue perdis. Lia riĉhava onklino plenedukis lin. Li finis unue tekstilteknikan ĉeflernejon. Poste, en 1936 en urbo Szeged – post liaj studoj – en la universitato li akiris lingvoinstruistan diplomon pri la lingvoj hungara kaj franca. Poste, kiel poeto, arttradukisto kaj privata instruisto gajnis siajn enspezojn por vivi. En 1937, pro sia literatura verkado li ricevis „Baumgarten”- premion. Dum siaj vojaĝoj en la 1937-a kaj la 1939-a jaroj en Parizo, li konatiĝis kun la moderna franca literaturo kaj arto. Ĉar li interesiĝis pri la internacia laboristmovado kaj estis jud-devena, li baldaŭ kontraŭiĝis al la hungara faŝismo. Oni persekutis lin en la serbian Bor en 1944, poste per perforta marŝado kun siaj samsortanoj enpelitaj estis al Germanio pere de la nazioj.

Ankoraŭ sur hungara teritorio iu naziulo mortpafis lin dumvoje, kaj li estiĝis entombigita en vojrandan amastombon. Kiam oni elterigis lin, per la deziro denove entombigi lin sed honeste, troviĝis la laste verkitaĵoj kaj ceteraj objektoj el la mantelo de la murdita poeto

En tiuj poemoj li priskribis la travivitajn homajn humiligojn, la mizeron de la devigaj laborservojn farantuloj, la teruraĵojn de la lageroj de nazianoj kaj la hororigan mortmarŝadon.

El la amastombo de Abda troviĝantaj objektoj estas videblaj sur la sekva retejo, kies aludon plusendis al nia gazeto: sinjorino Ilona Böde:

Ĉi tiuj objektoj videblaj estis dum ekspozicio en la Akademia Biblioteko en Budapeŝto. En liaj verkoj inter aliaj aperas ankaŭ la amo kaj sopiro al la patrujo kaj la edzino. Liaj tradukaĵoj el la franca literaturo estis eldonitaj en la volumo „En spuro de Orpheo”, en kiu li prezentis siajn hungarlingvajn tradukojn ĉefe el verkoj de la elstaraj modernaj francaj verkistoj. Inter ceteraj ankaŭ de Apollinaire kaj Cocteau. Sed li tradukis ankaŭ de Lafontaine.

En la serbia setlejo Bor, oni levis skulptaĵon al la poeto.

Nun, ni prezentos du tre belajn poemojn de la poeto, kiuj eldonitaj estis en la HUNGARA ANTOLOGIO, eldonita en Budapeŝto, (Eldonejo Corvina, 1983).

Adri Pásztor

Miklós Radnóti **Kiel mi scius...**

Kiel mi scius, kion signifas por alia
ĉi region' flamonta? Por mi la idila
pejzaĝ' de l' infanaĝo ĉi eta lando estis.
Kiel la arbotrunko branĉet', mi el ĝi kreskis,
kaj, mi esperas, en ĝi mi kuŝos iam kviete.
Mi estas hejme. Kiam genuas apudpiede
arbet', mi scias ties nomon kaj floron, scias,
kiuj kaj kien iras survoje, emocias
min scii, kio estas, se en somervespero
dolor' ruĝanta fluas de sur la dom-mortero.
Maŝinflugisto povas sur mapo ĝin rigardi,
Sen scio, kie loĝis Mikaelo Vörösmarty.
Por li la map' uzinon, kazernon krudan bildas,
Por mi kampkorto, turo, cikado, bovo mildas.
Li vidas lorne agrojn, uzinojn el la foro,
Mi ankaŭ laborulon, tremantan pri l' laboro,
Birdfajfan horton, boskon, vitojn, tombejon foran,
Kaj tie, inter tomboj, avinjon softe ploran.
Desupre detruinda fervojo – kaj jen budo
De relgardisto, kiu ĉestaras kun saluto
Kun ruĝa flag' en mano, kun infanar' ĉeflanka;
Sur uzinkorto kuŝas gardhundo granda, blanka.
Kaj jen la park', la spuro de junaj amoj ŝtelaj,
En mia buŝ' kisgutoj mielaj kaj mirtelaj.
Trotuar-rande, kiam lernejen mi paŝetis,
Por ne respondi devi en tiu tag', mi tretis
Sur ŝtonon – jen – ĉi ŝtono, sed ja ĝi ne vidiĝas
Desupre, instrumentoj ĝin montri ne sufiĉas.
Ni pekis tiel same kiel aliaj gentoj
kaj scias, kie, kiel kaj kial urĝus pentoj,

sed laboruloj vivas ĉi tie kaj poetoj
senpekaj, kaj kun menso kreskanta, infanetoj,
kiuj la menslumeton kaŝas en kel' obskura,
sed se la Paco signos, per voĉo freŝe pura
respondos nian voĉon, surdan de prema dubo.
Nin kovras grandflugile, viglanta nokta nuboj!

(Kálmán Kalocsay)

Miklós Radnóti **Letero al la edzino**

Misteraj, mutaj mondoj en la valo.
Silent' ululas en la mensĝangalo.
Mi krias vane, surde – sen respondo:
Serbio svena. El la fora mondo
jen via voĉ' traplektas sonĝon mian,
kaj venas tag', sed ĝin mi aŭdas ĉiam.
Silenton do, dum ĉirkaŭ mi ekzumas
filikoj friskaj, kaj min alpalpumas.

Ho, kiam povos vi, mi vidi nove?
Vin, kiu firmis psalme, ĉiupove,
kaj belis kiel lumo, kiel ombro.
Mi trovas vin en blindo, muta sombro.
Vi estas ĉe mi. Al okuloj – por mi
vi ŝvebas elen, mens' vin povas formi.
Realo estis vi, nun revo sankta.
En puton de l' bubaĝo refalanta,

ĵaluza mi postulas amkonfeson,
vi donu, kiel iam la promeson
pri ligo nia. Brilas amespero,
sed krudas ree vojo de la vero:
mi scias, vi edzin' jam mia estas,
sed nin tri limoj brutaj disarestas.
Aŭtunas jam, ĉu velk' min plu katenos?
Pri kisoj niaj bild', pli akra, venos.

Miraklojn kredis mi, sed ili pasis,
kaj bombmaŝinoj sur ĉiel' amasis.
Okulobluon vian mi admiris,
sed bombflugantoj ĝin en nubon tiris –
atakopretaj. Kaj mi tamen spiras.
Kaptit' mi estas; kion mi aspiras,
mi juĝas sobre. Tamen foj' post fojo
mi marŝas sur l' anima longa vojo;

mi migris landojn en ardaĵ' purpura,
se devos, min mi sorĉos trans la nura
flamar' por spiti ĉion, hejmen veni,
mi povos kruste min al kroĉe teni.
Valora, pli ol armilar', potenco,
la mut' de viroj en danĝerodensoj
trankvilon donas. Kvazaŭ friska flu' –
min volvas sobro de l' duoble du.

(Ferenc Szilágyi)

Ni funebras Forpasis Sylla Chaves

La novaĵo pri la morto de Sylla Chaves ege surprizis min. Nur antaŭ unu monato ni ankoraŭ estis farantaj planojn pri nova vortara laboro.

Malaperas granda esperantisto. Al ĉiuj liaj proksimuloj kaj al ĉiuj brazilaj esperantistoj, nome de la Akademio de Esperanto, kies membro li estis de 1986 ĝis 1995, kaj kies korespondanto li estis poste, mi prezentas la kondolecon de ĉiuj liaj akademiaj kolegoj.

Honore al li mi ŝatas atentigi ĉiujn pri lia lasta vortaro: Oportuna Poŝvortaro Esperanta-Portugala, Riodejaneiro: Eldonejo Oportuno, 2008.

Lia dediĉa teksteto estas la jena: "Mi dediĉas tiun ĉi vortaron al Claude Piron kaj al ĉiuj aliaj, kiuj klopodis, ke Esperanto restu la bona lingvo kreita de Zamenhof, sane kreskanta, akompananta la kompleksiĝon de la mondo kaj gardanta siajn denaskajn simplecon kaj fleksebelcon, por ke ĝi meritu fariĝi la pontlingvo de ĉiuj popoloj de la Tria Jarmilo."

Ĉi tiu spirita testamento meritas esti primeditata de ĉiuj.

Bedaŭre

Renato Corsetti
Sekretario de la Akademio de Esperanto

Ankaŭ nome de EAR „Király Lajos”(el urbo Miskolc) kondolencas pro forpaso de la elstara aktivulo de nia movado:

Geedzoj Pásztor

“Kultura Centro Banko de Brazilo” en la urbo Rio-de-Janeiro



Esperantistino, ĉe la statuo de Budho, dum omaĝo al la unua japana enmigra jarcento en Brazilo.

Popularigo de Esperanto en Brazilo – La bildon sendis: Aloisio Sartorio, el Brazilo

La ĝojplena plendo

Ni nun publikas la de ni ricevitan leteron de nia Esperanto-Amikrondanino:
„Karaj Adri kaj László!

Mi petas vin ne koleri min, pro mia ŝajna malapero. Mi dankas la senditajn bildojn. Mi nepre rigardos ilin, sed nun, unue mi elektis la letterskribon. Nuntempe la ripozo estas nekonata vorto en mia vortaro. Nun, mi staras ĵus, antaŭ unu granda aventuro, ĉar post la hodiaŭa noktomezo, je la unua frumatene mi ekiras kun ses infanoj en Anglion. Vi certe rememoras, ke mi gajnis unu Eŭropunian konkurson kaj nun ni vojaĝos - en ties kadro – por kvin tagoj al la angla partnerlernejo. Samtempe tie estos ankaŭ la germanaj gelernantoj kaj ankaŭ la tieaj gekolegoj. En ĉiuj tri lernejoj daŭras esperantoinstruado., ĉi tio estas la komuna lingvo de la konkurso. Mi atendas per granda ekscito ĉi tiun komunan laboron. Ni multe laboris tiucele kaj ĝis la celatingo mi ekscitiĝos multe daŭre, por la bonrezulto.

En la sekva numero de la „Juna Amiko” - kiu nun aperos – vi trovos dupaĝan artikolon pri nia lernejo kaj pri la konkurso. ...

Dank’ al Dio - mi fartas bone, nekalkulante la lacecon kaŭzitan de la multa laboro. Mi admiras foj-foje, kiel mi povas fini tiome multan laboron neripozante. Sed, mi esperas, ke en la estonto mi povos same agadi ankoraŭ longe. ...

Ame mi salutas ambaŭ vin:

Ilona Fedor”

JULIO NOVOTNY

LA AVAŜ - MONTA REFORMATA PREĜEJO

Kunlaborantoj de la hungarlingva eldonaĵo estis:

Lektoris: Géza Entz

Jozefo Szabadfalvi

Redaktoro: Julio Novotny

Teknika redaktoro: Georgo Ducsay

La fotojn preparis kaj la kovrilon planis: Ede Valent

ISBN 963 00 0523 9

Eldonis la Avaŝ-monta Kalvinana Eklezio

Respondeca eldonisto: Julio Novotny

Prepariĝis ĉe la Borŝod-departementa Presindustria Entrepreno.

Respondeca direktoro: Adalberto Kilián

Esperantigis: Ladislao Pásztor – Miskolc, Hungario

Reviziis: Attila Makay – Oradea, Rumanio

- daŭrigo -

HISTORIO DE LA PREĜEJO EN LA 19 – 20. JARCENTOJ LA TERTREMO -.PROTESTANTOJ DUM LA PUBLIKA KUNVENO

Neatendita okazintaĵo ekĝenas trankvilon de la urbo kaj la ekvilibron de la eklezia kaso, ĉar tertremo skuis la urbon la 15-an de oktobro 1834 matene je la 8-a horo. Tomboŝtonoj terenfalas, sed la preĝejo suferis pli grandajn damaĝojn, ĉar ties dikaj ŝtonmuroj krevadis. La situacio estis teruriga pro la orienta muro, kiu meze - de la tiam ankoraŭ masonfermita fenestro- ĝis la planko krevis. Ĉi tiun oni povis vidi ankaŭ dum la nuna renovigo okaze de translokigo de la tombokovrilo de Johano Négyesi Szepessy. La kredo estis 3-5 cm-ojn larĝa. Laŭ la protokolo, la Konsistorio okupiĝis detale kaj atenteme pri la detruo, sed el ĝi ne evidentis la kosto de la renovigo./ Ejkv.1834.IX.366./ Laŭ Johano Szendrey, la monsumo estis signifa.

Konsiderante la okazintaĵojn de la preĝejo, unue, ni devas paroli pri la agadoj faritaj en preĝejo. Inter la preĝejaj kunvenoj estas signifa tiu, kiun la Ĝis-Tibiska Eklezia Distrikto aranĝis la 15-an de novembro 1859 kaj kie prezidis episkopo. Paŭlo Apostol, La kunveno estis demonstra kaj protesta. Ĝi alportas rifuzan rezolucion pri la imperiestra ukazo, patentletero kaj kiun oni sendas al la reĝo en formo de surskribo. Dum tiu ĉi kunveno ĉeestis: barono Nikolao Vay, László Palóczy, Sigmundo Bernát, Gabrielo Kazinczy, Mikelo Tompa, Johano Erdélyi, Ludoviko Zsarnay, kaj multaj alireligiaj viroj ./ J. Szendrey.1911. 348. /

Ĉi tie ekzamenis en julio de 1847, Terezia Karacs, „ĉefinstruistino” dum lernojar-fina festo de tiu lernejo, kiun oni fondis en 1846, el lernejo de „pliaĝaj fraŭlinoj” al „fraŭlin-edukanta instituto.”Pri ĉi tiu festa okazo skribas Terezia Karacs: „...Kiam mi aperis kune kun miaj disĉiplinoj en la miŝkolca Avas-monta preĝejo por ekzameni unuafoje, ĉe pordo de la preĝejo akceptis min Jozefo Szatmári Paksy, eklezia inspektoro sekvamaniere: „Lasu mia Dio vian serviston, ĉar mi povis vidi la inaŭguron de tiu ĉi edukanta instituto, kiu signifas savon de niaj virinoj.” László Palóczy, help-kuratoro diris epilogon (dum)en la festo: „ Nur tiu lando kaj nacio povas esti libera, en kiu la viroj kaj virinoj estas same edukitaj.”

Pasas jardekoj, kiam en 1873, oni diras „neprokrastebla” tiun, presbiteran rezolucion: el la jaro 1812, kiu decidis purigadon kaj riparadon. Kompetentulo devas konsideri la preĝejon por konstati la neprokrasteblajn farendojn.

„La kompetentulo” kaj la delegitoj proponis, ke unue la muroj, fostoj, seĝoj estu purigitaj de la polvo, malpuraĵo... la muroj estu kalkitaj dufoje. Ekstere, la stukojn de la ĉefmuroj kaj helpfostoj oni devas ripari... antaŭe la malboniĝintaj seĝoj estas riparendaj, ktp. La delegitaro konsideris ankaŭ la turon, ĉar ties muroj kaj ŝinda -tegmento same atendas riparadon. La nepre bezonataj riparadoj pretendas 1500.-forintojn, kiujn oni deziras certigi. el donacaĵoj. La pereoj kaj malboniĝo estas tiel ege grandiozaj, ke la renovigon motivis eĉ la opinioj de la vizitantoj. Pri tiu ĉi en protokolo ni povas legi la sekvajn: „Jam delonge, honteme montras la eklezianoj al la vizitantoj nian preĝejon, ĉar ĉie en la preĝejo estas polvo kaj malpuraĵo.

/Ejkv.1873.246.fsz. Ĉi tiu polvo kaj malpuraĵo ĉeestis ĝis la tuta malkonstruo de la plafono.

Ĉar tra la truoj el la subtegmento la polvo konstante faladis, ankaŭ pro eluzo de la ruĝa briko-kovraĵo. Vane estis la konstanta purigado kaj la po jara. kalkado./

Efike de la ekagado de Emerigo Stein kaj liaj disĉiploj en 1878 aperas precizaj artobjektaj kaj arkitekturaj fotoj pri la preĝejo, kiuj havas gravan rolon. Pasas la jaroj rapide kaj ankaŭ la kompetentuloj ekatentas al sorto de la preĝejo. La Landa Arkeologia Societo petas informigan raporton, ke „Ĉu la Presbiterio konsentas pri laŭstila renovigo de la preĝejo?” Responde, ili petas Kolomanon Soltész Nagy por anonci:”La Presbiterio ne nur konsentas, sed treege deziras la renovigon.”/Ejkv.1889.18./

Sed la promesita renovigo dum longaj jaroj ne realiĝis. La di-serva ĉeestantaro ne povis solvi la taskon propraforte. Bartolomeo Kun, episkopo kunvokis la 20-an de aŭgusto 1893 la presbiterion, kiu pritraktas la raporton de kuratoro Stefano Mikuleczky. Li prelegas, tiel: „nia Avas-monta preĝejo estas en malbona stato!! kaj ĉi tiun sep- jarcentan preĝejon oni konvene devas restaŭri. Ĉi tiun decidis jam pli frue la administraciaj instancoj, sed la tiama Kultoministerio kaj Landa Arkeologia Societo renovigis aliajn konstruaĵojn / Matiaso-preĝejo de Buda, Katedralo de Kassa, Baziliko de Budapeŝto/. Iliaj rekonstruadoj elĉerpis la monsumojn kaj tiel ne restis financo al renovigo de la Avas-monta preĝejo. Sed nun la proksimiĝanta: jarmila datreveno de nia lando; kaj de la nun- epoka pieco kaj kiel la publika spirito; postulas laŭstilan renovigon de nia preĝejo, helpe de landa monhelpo... kaj ĉar nia eklezio ne havas financon por renovigi la preĝejon, pro ti(u)o ili urĝas la Landan Arkeologian Societon. Por peri ĉi tiun aferon ili petas episkopon Bartolomeon Kun. /Ejkv.1893.37.fsz./

Ĉar la ekagado promesiĝas rezulta, Ottó Sztehló, arkitekt-inĝeniero, en 1896 faras grandiozan rekonstruadan planon, kiun la Landa Komitato de Artobjektoj en 1900 akceptas, aprobas kaj permesas ĝin realigi. Sed tiu ĉi restas arkiva memoro.

LA JUNULARO EKAGAS

Ĉar estis senrezulta la agado de Bartolomeo Kun, la pereigo estas pli teruriga., (p)Pro tio dum la 1901.-jara kunveno, oni petas la ĉefkuratoron – ĉar mono ne estas – provu akiri prunte(prenon)donon.

/Ejkv.1901.104./ Ĉi tio estis sukcesa, tiel ĝis la fino de la jaro, oni faras la plej necesajn riparojn kaj ĉesigis la pluan malboniĝon.,/ Ejkv.1901.106./ sed ne pli grandan rekonstruadon.

Tiel ŝajnas, ke la sorto de la preĝejo estas grava kaj a- l presbiterio kaj a- l fakuloj, ĉar pli nova rekonstruata plano naskiĝas. Gustavo Marko faras en 1904, planon por realigi rekonstruadojn de la preĝejo, preĝejmeblaro kaj sonorilturo. Ankaŭ tiu plano, bedaŭrinde, restas arkiva materialo.

Samjare la juna pastraro – inter ili estas D-ro Stefano Tüdős, la pli malfrua episkopo kaj Stefano Farkas, kiu same iĝis episkopo – kaj la presbiterio ĉion faris, por akiri financon al la

grandioza konstruado, renovigo. La kolektado de la mono ne alportis la taŭgan rezulton, sekve, ili serĉas la registaron, estrojn de la departemento kaj urbo por helpo. Ili decidas, sendi delegitaron al reĝa moŝto, por ke li donu, iom el profito de la ŝtataj loterioj. Unue ili insistas pri la vico-ordeco ĉe la Artobjekta Landa Komitato. Ili komencas intensive la monkolektadon inter la kreduloj kaj klopodas aranĝi orgenkoncertojn. /Ejkv.1909.28./ Ĝi estis inda, ĉar pri la somere aranĝita celkoncerto de la sama jaro, multe da homoj interesiĝis kaj ties enspezo estis 1456.-kronoj por la konstruo.

En 1912 Kolomano Lux faris detalan restaŭran planon, kiun oni akceptis kaj petis lin fari ankaŭ la budĝeton./Ejkv.1912.8.fsz./ Dume ankaŭ la Landa Komitato de Artobjektoj anonciĝas komunikante, ke donas 50000.- kronojn por renovigo, kiun ĝi certigas jare, po 5000.- kronoj. /Ejkv.1914.14.fsz./ La mono malrapide kolektiĝas kaj post unu monato alvenas la unua mondmilito. Denove, kiel jam multfoje disiĝas la esperoj kaj ankaŭ la donacaĵoj malaperas, kiun oni devis doni pro la „sankta” celo kiel milit-pruntedonon.

INICIATOJ POST LA UNUA MONDMILITO

Post kelkaj jaroj fine de la mondmilito, kiam la vivo stabiliĝis, kaj ankaŭ militkaptitoj hejmen-alvenadas, tiam la pereigo jam estas grandmezura. La pluvo-akvo verŝiĝas en la preĝejon kaj turon. Ĉi tiun ankaŭ la Hungara Landa Komitato rimarkas /Ejkv. 1922. III. 22.7.fsz./ kaj sendas fakkomitaton en 1922. La Presbiterio kunvenas kaj okupiĝas ne nur pri la ŝindado, sed ankaŭ pri ŝanĝo de la trabaro. Denove preĝejkonstrua komitato formiĝas kaj prepariĝas la budĝeto per 1220000.- kronoj kiel kadro-monsumo. laŭ planoj de Kolomano Lux. Oni dezirus ricevi permeson por pli malmultekosta ardez-tegola kovro, ĉar la ligno ŝindado kostas 6-7 milionoj da kronoj. La Hungara Landa Komitato promesas unu milionoj da kronoj kiel helpon. /Ejkv.1922.13./ Dume la kostoj tre rapide grandiĝas. La pli nova budĝeto jam parolas pri cent milionoj da kronoj. /REĖ.1924.V.31.2./ Oni plialtigas la eklezian imposton je unu kaj duoblan, pro konstrua pluspago. Ili konstatis, ke bezonatas 140 milionoj da kronoj. Efike de urĝigo oni permesas la kovron per ardez-tegolo. Post komenco de la laboroj evidentiĝas la malbona stato de la tegmenta ĉarpentaĵo. Denove ili kolektas donacaĵojn, akiras kreditojn, ĉi tiel pretiĝas nova plano. En 1924 Julio Sándy, konsideris la taskojn, faritajn en 1923. Li konstatis, ke oni faris la plej urĝajn farendojn. La kovro per brunaj ardezoj bone sukcesis, kaj ne ĝenas la artobjektan karakteron de la preĝejo. Sed ili devas daŭrigi la renovigajn laborojn, ĉar la stuko ĉie ekfalas danĝere kaj kelkloke sur la muroj ankaŭ kreviĝas estas videblaj; ne parolante pri tiu, ke la „malantaŭa enireja fronto” estas sen kovraĵo. La presbiterio denove interkonsiliĝas kaj konstatas, ke por tiuj grandiozaj laboroj, la eklezio havas nur kvindek milionoj da kronoj,; el donacaĵoj, el interezoj de fondaĵoj kaj el valor-paperoj. Ĉi tiuj ne estas sufiĉaj por laboroj. Ankaŭ la sonorilturo havas malbonstaton. Pro tio, denove la kreduloj okazigas kolektadon..

Stefano Farkas skribas entuziasmigan artikolon en la „Miŝkolca Reformata Eklezia Informo” sub titolo „Plua konstruo de nia Avas-monta preĝejo.”/REĖ.1924.X.15./ Efike de tiu la kreduloj denove donacadas. Dum la monkolektado oni malkonstruas – laŭ propono de Julio Sándy – la nordan malmodernan triforion, kiu reprezentis dum jarcentoj plie la malriĉecon, ol la uzeblecon. Spite de tio ĝi estis sidloko por studentaro de la najbara ĉefgimnazio dum la Diservoj kaj lernejoj festoj. Post malkonstruo de la triforio la „Eklezia Informo” ĉi tiel rememoras: „La muroj sen la triforio certigas la festan efikon de la preĝejinterno./Ejkv.1924.7.fsz./ Oni rememoras pri laboro de pastoro Stefano Farkas, kaj dankas la direktigon al la urba teknika ĉefkonsilanto Stefano Báthory, kiel la renovigajn laborojn al pentristo Johano Dospoly, kaj al la romkatolika Mikelo Hajós, farbisto, kiuj senpage faris tiujn laborojn.

En 1924 la presbiterio decidis tiel, ke „la turon oni devas kovri per skvamo-ardezoj.” Sed tiu ĉi ne realiĝis pro aĉetad- malfacilaĵoj / Ejkv.1924.XII.21.7.fsz./

PLANO DE LA GRANDIOZA RENOVIGO

La konstrua elano kaj entuziasmo ne malpliĝis. En la sekva jaro je iniciato de Jozefo Tury oni elterigis iun masonfermitan fenestron de la norda flanko, kies kosto estis kvin milionoj de kronoj. La restitan tricent mil kronoj oni rezervas al kostoj por elterigi la masonfermitan fenestron de la orienta flanko./ REÉ.1925.XI.8./

Dume el la malboniĝinta subtegmento konstante faladis la polvo, denove la muroj malpuriĝis, kaj malboniĝis la stato de benkoj. Por riparoj ne estis sufiĉa financo ĉar estis bezonata ankoraŭ pli nova renovigo, kiun pravas ankaŭ opinioj de la vizitantoj.

D-ro Zoltano Horváth, pli malfrua kuratoro, en 1933 proponis renovigon de la preĝejo, ĉefe renovigon de la malkonfortaj kadukaj benkoj./Ejkv.1933.XII./

Ni devas menci la danĝeron signantan artikolon de D-ro Gaspar Klein, kiu aperis en la literatura kaj arta revuo „Frukto”, en 1937. Li atentigas pri tiu, ke la preĝejon kaj ĝian meblaron danĝerigas la kali-trioksi-nitrata enhavo de la tero. Pri tiu ĉi afero la ekleziaj kaj mondaj institucioj devas disponi urĝe./ G.Klein.1937.5./

La jaroj denove pasas kaj estas komprenebla, ke en 1939, la presbiterio de la Avas-monta eklezio petas en memorando la Centran Presbiterion por renovigi la internon de la preĝejo. Efike de petskribo, samjare, ĉe norda flanko de la preĝejo de la enira ĉambrego al oriento – inter du pilieroj – komenciĝas esplora malkovro. Dum la laboro, oni trovas bazmurojn, kiuj verŝajne apartenis al 15- jarcenta sakristio. Poste la okazintaĵoj sekvas unu la alian. Unue, laŭ propono de Kolomano Lux, oni malkonstruas la restaĵon de orienta triforio, due en 1941, krom stato-konservado oni faras grandiozajn internajn laborojn./Ejkv.1940.XII./

Pli frue Stefano Mikuleczky okupiĝis pri rekonstruado de la preĝejo, dezirante realigi en la meznavo retvolbaron, kaj en la flankonavo krucvolbarojn. Sed tiu ĉi plano bedaŭrinde restis nur plano pro manko de financo. Sed la preĝejon estimanta kaj honoranta urbo, ĉiam la originalan volbaron volis rekonstrui.

MALKOVRO DE MEGAY

Estis menciita jam, ke en 1941 la Borsod-Miskolc-Muzeo farigis fosadon en interno de la preĝejo pri la grandmezuraj renovigaj laboroj. Estro de la malkovo estis Géza Megay. Kadre de tiu ĉi, je forigo de sidbenkoj, oni trovis neatendite ĉe la norda flanko de la enirejo al oriento, malnovan -- per sidbenko kovritan—pordokadron orname formitan decidite kiel gotika kaj de ĝi okcidenten, iun, laŭ gotika stilo skulptitan ciborion /pastoforion/. Malkovro de la pordokadro atestis la supozon de la 1939- jara esplora fosado, – kiun oni fosis ĉe norda flanko de la preĝejo, - t.e. la malkovritaj baz-muroj pravas la ekziston de iu eks-sakristio. Poste plu esplorante, oni trovis sur la norda muro ekstere, ankaŭ la eksteran kadron de la (el) sakristia pordo./ G.Megay.1971.4./

Do, Géza Megay faris malkovradon, ne nur sub la tero sed ankaŭ muresploradon tie kie jam malgluiĝis la kalkotavolo. En dekunu punktoj, li notis la freskojn kaj freskofragmentojn, el inter kiuj ni komunikas la plej interesajn:

1. De norda pordego orienten estas per ruĝa farbo skribita surskribo.
2. De tie ĉi al oriento estas figuro de iu sanktulo en rondomedaliono.
3. Apud la ciboria kamero estas iu pentraĵo en medaliono.
4. Sur la norda muro, sub la unua gotika fenestro estas figuro de iu sanktulo en medaliono.
5. Sur la suda muro, malantaŭ la seĝo de la pastro estas figuro de iu sanktulo en medaliono.

6. Sub la ĥorejo apud la -el muro elliberigita iama konzolo- estas fragmentoj de genuanta, figuro, portanta glavon.

Bedaŭrinde ĉi tiuj freskofragmentoj sen konservado pereis., escepte la lasta,- el kiu nur kolormakuloj estis videblaj- kaj kiun en 1981 la Landa Artobjekta Inspektoro konservigis., Nun ni povas bedaŭri jam ilian pereon. En la 1980-.-jara renovigo, (pro)dum la riparadoj kaj kalkadoj, sub la krevitaj kalkotavoloj, la laboristoj trovis en girlandon plektitajn florojn kaj ceterajn farbospurojn. Tasko de la sekva jarcento estos malkovri ĉi tiujn freskojn. Ĉu iu povas diri: kial ne okazas ĉi tiuj dum kadro de la kvin jara rekonstruado? Pro ĉi tiu renovigo dum kvin jaroj oni ne povis uzi la preĝejon por aranĝi Di-servojn, koncertojn, festojn. Kvin jarojn pretendis ankaŭ la muresploro kaj la apartenanta restaŭro kaj konservado. La Artobjekta Inspektoro aŭskultante la argumentojn, kaj petojn de la presbiterio konsideris lasi netuŝite la freskojn sub la kalkotavolo. Ni devas noti en intereso de la objektiveco, ke Géza Megay en sia enskribo konfesas: „ La malkovron pro la transformigadaj laboroj de la preĝejo ni povis fari nur ne pripensite sur tiuj lokoj, kie ni ne ĝenis la daŭran laboron.”/ G.Megay.1970.5. G. Megay ne mencias en sia pri- tomboj tenanta notado, sed J.Szendrei notas en lia laboro – II.k.237.c. – „en 1655, iun pli novan ekzemplon de la en preĝejo okazita entombigado, dum tio la urba konsilantaro permesas al Sigmundo Tibold, tombigi sian fileton en internon de la Avas-monta preĝejo. Pro tio li devigas sin, proprakoste konstrui ĝustan, honoran ĥorejon, por studentoj:.

Ĉi tie ni mencias, ke grupo de Megay trovis en interna tereno de la preĝejo kovr(an)itajn platajn kriptojn de kvar familioj / familio de Johano Négyesi Szepessy, -desegnaĵo de Ludoviko Lócsey – Petro Négyesi Szepessy, Andreo Hobaházi Dőry kaj sinjorino Ambrus Miskolczi, nask.Katarina Illavölgyi./ Ĉi tiuj kriptoj estis ornamitaj per blazonoj de siaj familioj. Ĉi tiujn ornamitajn kriptojn oni trovis en malordo, metite. sub la planko, el skulptitaj kvadroŝtonoj. Krome oni trovis sennombran tombon aŭ tomboŝtonon.

La 16-18.j arcentajn tombojn, kriptojn karakterizas, ke en ili, troviĝis relative multe da tutaj skeletoj. Tiel same, oni trovis: kapkusenon el ruĝa veluro, brunan velurĉapelon, bant-kravaton el tulmaterialo, longan flavan silkan funebro- mantelon, silkan pantoflo- samajn ŝuojn, etajn botojn, antaŭon de speciala hungara ornamvestaĵo per arĝentaj butonoj, kapornamon kaj perlan virgulin-kufon. Oni rimarkis sur la kranio helbrunan hararon, vilajn brovojn kaj grizajn barbo-restaĵojn. Oni trovis ĝis ŝultro atingantan blond-brunan hararon de Katarina Illavölgyi, ktp, ktp.Oni liveris la karakterajn pecojn de la vestaĵoj en la muzeon por restaŭri kaj konservi ilin. La ostojn kaj ceterajn restaĵojn oni lasis sur siaj lokoj pro pieco. Oni konstatas ankaŭ tion, ke iu malfermis pli antaŭe la kriptojn. La forrabadon pruvas tiu, ke kiam la preĝejo estis ruina, tiam la kriptojn nerajtigitoj perforte rompis kaj prirabis.. Ĉi tiun atestas ankaŭ la dika, skulptita blokŝtono, kiu kovris la tombon la platan de Johano Szepessy. Oni trovis ĝin, duonrompita, dum la rekonstruado en la orienta muro de la preĝejo, kovris. Dum la 1941-.-jara renovigo la preĝejo ricevis tute novan meblaron, laŭ planoj de Bálint Szeghalmy, utiligante parte la malnovan ligno materialon de la sidbenkoj. Oni renovigis la tablon de Disinjoro kaj ankaŭ la predikseĝon. La antaŭan balustradon, kiu estis ĉirkaŭ la tablo de Disinjoro, oni metis en la (stano) antaŭĉambrego. Oni faris brikoplankon, novajn numero- tabulojn. Oni malaperigis la kovraĵon havantajn benkojn, metante tiujn en la flankonavon por ne ĝeni la vidon.

LA 1941. JARA KONSEKRO DE LA PREĜEJO

„ La 7-an de septembro ni inaŭguris dum serene sunbrila dimanĉo – eternigis la okazintaĵon la Reformata Eklezia Informo – post longa malfacila laboro, nian, interne renovigitan, Avas-montan preĝejon.... Petro Pósa, eklezia distrikt-estro ricevis la ŝlosilon de Aleksandro Pocsai,

vickuratoro kaj malfermis la pordon de la sankta eklezio. Poste grandnombra publiko de la festa di-servo eniris la renovigitan sanktan hejmon. Dum la konsekra ceremonio Julio Novotny, misio-pastro laŭtlegis versojn: JER 7,1-7, kaj post lia preĝo; Petro Pósa, eklezia distrik-estro predikis laŭ la teksto de Ef. 5,19-20.. Ĉi tiun tekston oni trovis surskribite sur tiu fosto, kiu estis enkonstruite en la malnovan triforion kaj oni malkovris ĝin dum la internaj esploroj. . Tiun foston oni kune metis kun la ceteraj malkovraĵoj sub la ĥorejon, en la okcidenta parto. Fine de festo okazis distribuo de Sankta Manĝo de D-ro Andor Enyedi, pastoro, kiu anoncis gravajn sciindaĵojn. La interesa raporto invitas sekvamaniere: - La per ofero kaj multe da monoj renovigita kaj inaŭgurita preĝejo atendas nun jam ankaŭ tiujn, kiuj ĝis nun ne iris tien: pro la malbona vojo, ĝiaj malbonaj benkoj kaj ĝia malhela interno.- / REĖ.1941.IX.16.6.sz./

Sed post la festo ne finiĝas la renovigo. Kun direktado de Bálint Szeghalmy en 1944 oni elterigas mezan fenestron de la iama sanktejo kaj en 1945 oni faras 12000.-forintajn eksterajn riparajn laborojn. Post tri jaroj, oni farigas la elektran lumigadon. La monsumon de la pli nova monkollektado, oni utiligas por solvi la hejtadon de la preĝejo. Sed ĉi tiu neniam funkciis pro la faritaj malfacilaĵoj de kurent-provizada entrepreno. Ties elementojn oni eĉ malmuntis okaze de la lasta renovigo.

En 1955 Géza Entz prenas sub sian protektadon la aferon de la preĝejo kaj vekas la atenton de la Nordhungaria Projekt- Oficejo: Kaj li petas ties kunlaboron por la renovigo de la preĝejo, motivante, ke „la Avas-monta preĝejo, kiel signifa artobjekto apartenas ne nur al Miskolc, sed ankaŭ al la tuta lando.”

Falanta stuko de sur la sabloŝtonaj muroj, ĉiam kaŭzis problemon. La malboniĝadojn kaŭzas: la sabloŝtonoj kaj la kalio-trioksi-nitrata enhavo. En 1957, oni provis apliki ĉe la norda flanko dratreton en mortero. Samtempe oni malkovris la unuan fenestron de la suda flanko. Ĉar pro la krevita plafono konstante falas la polvo kaj malpuraĵo, en 1962 oni denove farbis per kalko la internan parton.

LA PLEJ GRANDIOZA RENOVIGO

La urba konsilantaro en 1969 donas kvin milionoj forintojn por eksteraj kaj internaj renovigoj. Laŭ la fotoj, kaj konstatoj de pli juna Adalberto Horváth, la plano enhavis ŝanĝon de ardezo-tegolo, la ĉesigon de la kalio-trioksi-nitrat-enhavon, plue ĉion, kiun oni devas renovigi.

Samtempe la Landa Artobjekta Inspektoro, laŭ la petitaj dokumentoj certigis (al)por la renovigo: 5 milionoj de forintoj kiel helpmonon.

Post la bezonataj preparigaj laboroj, somere de 1974 prepariĝas renoviga plano de Karlo Ferenczy kaj novembre de 1976, komenciĝas -la kvin jarojn pretendanta- granda laboro. Post la jaro 1978, Ferenc Erdei direktas kaj finas la renovigon, laŭ siaj planŝanĝigoj.

DETAĴOJ DE LA RENOVIGO

En historio de la preĝejo, la 1976-jara renoviĝo estis la plej grandioza, escepte de la incendioposta renovigo. La dekdu milionoj da forintoj financis komune la urba konsilantaro de Miskolc kaj la Landa Artobjekta Inspektoro. La eklezio povis entrepreni la purigadon, ornamadon renovigon de la orgeno kaj estiĝon de la voĉo-laŭtiga aparato. La restaŭradon direktis kelkaj entreprenoj kaj la Landa Artobjekta Inspektoro. Por sentigi la grandecon, amplekson de la renovigo ni komunikas la detalojn.

La tegmentan ĉarpentajon devis ŝanĝi; anstataŭ pin-traboj, oni metas fero-trabojn /farite en fabriko en Diósgyőr/ Post forigo de la ardezo-tegolo oni tegmentis per lignoŝindoj, imprenitaj kontraŭ fungo,-kaj flam-detruoj.

Oni metis novajn tegmentopintojn. Oni ŝanĝis la kronologian tabulon kaj fulmo-ŝirmilojn. De la tuta surfaco de la fronto Oni deprenis la dratreton de la sabloŝtonaj muroj kaj metis maldikan morteron, pensante pri tio, ke sur pilierojn oni metos lignoŝindojn anstataŭ la metintaj kovraj platoj..

Sur la pilierojn oni metis novan -el artefarita ŝtono faritan- apartigan kornicon kaj kompletigis la plintajn ŝtonojn kaj plintan randaĵ-kornicon.

Oni malkovris en la sanktejo-parto, ankoraŭ masonfermitajn, du fenestrojn kiujn samtempe renovigis kaj vitrumis. La pilierojn kaj murojn post la bezonata stukaĵo oni kalko-farbis, same kiel dum jarcentoj. En la interna tereno oni kompletigis la apartigan kornicon, la fostojn kaj la aperturo-kadrojn. Oni renovigis, ekstere-interne la nordan kaj sudan flanko-konstruaĵojn: la enir-ĉambregon, kaj la katafalkon eĉ muntis muro-bolton en nordan enir-ĉambregon. La preĝejo ricevis anstataŭ la malnova ruĝa briko-kovraĵo, sur tiun metitan, Süttó-devenan ŝton-kovraĵon. Oni renovigis la elektran lumigadon kaj muntis novajn lampojn donante modernan lumigadon al la preĝejo.

Oni faris moveblaj la ĉirkaŭbaritan podion kune kun ĝia tablo de la di-sinjoro, la tutan meblaron kaj la pastorajn seĝojn oni tute renovigis- pri kiu ankoraŭ ni parolos - por certigi lokon kiun pretendas okaze koruso kaj/aŭ orkestro.

Per tubosistemo, ventola kaj akvo-drena sistemoj oni solvis la pluvo-dekondukon kaj malpliigis la kalio-trioksi-nitrat-enhavon. .

Post la teknika transdono, je la fino de 1981 okazis, la eklezia festo, kaj la konsekro, la 16-an de majo 1982, kadre de landa festo. La Hungara Poŝto memoris pri la 500-jara datreveno, aranĝante eklezian marko-prezentadon, eldonis stampitajn poŝtkartojn kaj surloke funkciigis poŝtoŝtancojn dum la festotago. Posttagmeze la Muzeo „Herman Ottó” en ekspozicio prezentis kult-objektojn de la preĝejo. Kaj vespere okazis festa inaŭgura koncerto.

- ni daŭrigos -

ŜERCO

Sur ŝnurego de helikoptero

Iutage dekunu homoj pendis sur ŝnurego de iu helikoptero, dek viroj kaj unu virinoj.

Ĉar la ŝnurego ne estis sufiĉe forta, ne povis teni la dekunu homojn. Ili tiel decidis, ke unu persono devas salti malsupren, kontraŭe ĉiuj mortos. Ili ne povis konsenti pri persono de la viktimo.

Subite la virino diris iun mallongan, sed emocian parolon dirante, ke ŝi estos la viktimo, ĉar la virinoj alkiutimiĝis al tio, ke en interesoj de siaj filoj kaj edzoj rezignu pri ĉio, kontraŭ la diro kaj ricevo kiel rekompenco.

Fine de ŝia parolo ĉiuj viroj komencis aplaŭdi.....

Instruaĵo: Neniam estas permesata subtaksi potencon de la virinoj.....

La glaso

-Jean, Kial vi trinkas el malplena glaso?

-Mi ne estas soifa, sinjoro mia.

La pozitiveco

- Nu, Mi povas diri unu pozitivan aferon pri sia infano.
- Kio ĝi estas?
- Nome, rigardante ties kvalifikojn, mi estas certa, ke tiu ne kutimis kaŝkopii.

La helpo

Iu fortan dioptiron havantan okulvitron portanta maljuna onjo alparolas iun infaneton sur la strato:

- Infaneto, ĉu vi povas helpi min por trairi sur alian flankon de la strato?
- Volonte. Ĉu vi loĝas tie?
- Ne. Tie estas mia aŭtomobilo.

/Esperantigis László Pásztor

Informoj

„IKU EN BĴALISTOKO: KREMO EL 30 PROPONOJ”

La membroj de la UEA-komsiono pri la Internacia Kongresa Universitato havis cxi-jare nekutime multe da laboro, cxar ili devis ekspertizi entute 30 prelegproponojn por la 62-a sesio de IKU en la 94-a UK en Bjalistoko (25 julio – 1 aŭgusto 2009). La Estraro de UEA, kiu aprobis la finan programon de IKU, sekvis la rekomendon de la Komisiono.

La Bjalistoka IKU-sesio konsistos el jenaj prelegoj:

- Tomasz Chmielik: "Kvin urboj de fratoj Goskind";
- Barbara Despiny: "Pol-litova Unio: respubliko de multaj nacioj";
- Nicolau Dols Salas: "Perspektivoj en fonetika kaj fonologia esplorado de Esperanto";
- Mark Fettes: "Cxu eblas kultivi imagipovon? Enkonduko en radikalan edukteorion kaj praktikon";
- Mauro La Torre: "Nombrado: ila, vorta, cifera";
- Árpád Máthé: "Esperantistaj redaktoroj de Zamenhof kaj aliaj pioniroj gxis la nuntempaj";
- Otto Prytz: "La invento de la jubileulo Louis Braille - dauxrigebla kaj dauxriginda";
- Tsvi Sadan (Tsuguya Sasaki): "Socilingvistika komparo de du diasporaj lingvoj, la jida kaj Esperanto, en Interreto";
- Amri Wandel: "Teleskopoj - de Galileo gxis la spacteleskopo".

La prelegoj de Nicolau Dols Salas, Tsvi Sadan kaj Amri Wandel estos samtempe kursoj de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). La kunlaboro inter IKU kaj AIS komenciĝis en la Tamperea UK en 1995. Cxiu dumkongresa AIS-kurso konsistas el tri prelegoj, el kiuj la unua estas IKU-prelego, sekvata de du daŭrigaj prelegoj, en kiuj la preleganto prezentas sian temon pli profunde kaj vaste.

La prelegtekstoj aperos kiel t.n. IKU-libro, lanĉota en la UK. En la Libroservo de UEA estas ankoraŭ haveblaj IKU-libroj de kelkaj antaŭaj jaroj. Pluraj IKU-libroj kaj la resumoj de la ĉi-jaraj prelefoj estas konsulteblaj ankaŭ en la kongresa retejo:

<http://www.uea.org/dokumentoj/IKU/index.html>

[Gazetaraj Komunikoj de UEA]

Saluton!

La nederlanda novaĵservo por radio kaj televido NOS produktis 10-linian novaĵeton kaj kelkminutan filmeton (en la nederlanda) okaze de la eŭropaj elektoj. Temas pri Esperanto, ĝia uzado kaj "Eŭropo - Demokratio - Esperanto", kun pluraj intervjuoj.

http://headlines.nos.nl/forum.php/list_messages/15307

Informo de: leonov@rozabg.com

Temo: seminario

Kara Amiko,

Ĉu Vi jam decidis partopreni nian semionarion? Antaŭ monato mi skribis al Vi mesaĝon invitinte Vin denove por nia Seminario. Bedaŭrinde nia retsistemo en nia urbo ne ĉu iam funkcias bone, kaj mi ne estas certa ĉu Vi ricevis mian leteron. Pro tio mi decidis denove skribi al Vi. Kun ĝojo mi dezirus informi Vin, ke jam estas intereso flanke de famaj bulgaraj scienculoj, profesoroj en bulgaraj universitatoj, funkciuloj de la Scienc-Teknika Asocio en Bulgario kaj aliaj fakuloj, kiuj malgraŭ, ke ne estas esperantistoj dezirus persone konatiĝi kun fakuloj-esperantistoj kaj funkciuloj de la Internacia E-agado, kiel Vi!

Ni atendas partoprenon flanke de oficiuloj reprezentantoj de la ŝtataj instancoj, ĵurnalistoj de Radio, TV kaj gazetaro. Kompreneble Via persona ĉeesto, kontribuos por la plialtiĝo de la nivelo kaj aŭtoritato de la seminario kaj ankaŭ por la aŭtoritato de la bulgara kaj internacia E-movado, ĉar vere por unua fojo ni organizas E-Seminarion, sed ne nur por la esperantistoj!

Mi nun uzas la okazon denove inviti Vin. Ni dankos al Vi, se Vi invitos Viajn konatojn, kiuj ne estas esperantistoj, sed dezirus konatiĝi kun bulgaraj kaj eksterlandaj fakuloj trapasonte kelktagojn en amika rondo. Ili ankaŭ povus partopreni la prelegojn kaj la diskutojn, ĉar kiel ni sciigis en la informilo laborlingvoj estos la lingvoj de ĉiuj partoprenontoj-neesperantistoj, kies samlandanoj-gekolegoj-esperantistoj tradukos koncize nacilingve kaj helpos al ili partopreni la diskutojn. Pro tio, kiel mi jam menciis nia seminario estos Esperanta, sed ne nur por esperantistoj ĝia sukceso havos propagandan por la E-movado signifon!

Partoprenonte la Seminarion, Vi ne estos devigota prelegi - Vi povus partopreni la diskutojn, sed se Vi dezirus Vi povus prelegi pri elektota de Vi temo.

Mi ankaŭ esperas, ke Vi povus fari utilajn personajn profesiajn kontaktojn dum la seminariaj tagoj. Ni cerigos en la programo tempon kaj lokon, krom por la plenkunsidoj ankaŭ por fakkunsidoj. Tio estas la ĉefa celo de nia Seminario.

Kun estimo kaj plej koraj salutoj

Restas amike Via :

Boĵidar Leonov

Pliaj detaloj kaj kontakt-adreso:

12 - 15. junio -- Internacia seminario "Apliko de Esperanto en la faka kaj profesia agado" en Karlovo, Bulgario. Internacia Seminario, BG-4300 Karlovo, p.k.44. Bulgario, prof. Bojidar Leonov, tel.: +359 885056469, leonov@rozabg.com

"UEA viva"

Kara membro de UEA,

UEA lanchis novajn servojn en Interreto. Meze de majo aperis la unua numero de "UEA viva", 10-minuta filmjurnalo kun raportetoj pri aktualajhoj en UEA, TEJO kaj la Centra Oficejo, pri novaj libroj, ktp. Jam aperis du numeroj.

Iom pli frue ekfunkciis reta kinejo, kie eblas jam spekti programerojn de la aprila Malferma Tago de la CO kaj historiajn dokumentojn pri la unua IJK en 1938 kaj pri IJK kaj UK en 1959. Iom post iom oni aldonos aliajn filmojn.

"UEA viva" trovighas en

<http://www.youtube.com/UEAviva>

La reta kinejo trovighas en

<http://www.ipernity.com/doc/97850/home/video>

La aperritmo de numeroj de "UEA viva" kaj de novaj filmoj en la reta kinej dependos de ilia populareco. Mi invitas vin regule rigardi ilin kaj diskonigi ilin! Oni povas finance subteni la produktadon de tiuj novaj servoj per donaco al la konto "video" che UEA. Koran dankon!

Osmo Buller

ghenerala direktoro de UEA"

Betty Chatterjee

Impresoj pri la 2-a Mezorianta Kunveno kaj la postkongreso en Turkio la 3-a ĝis la 10-a de aprilo 2009a

La unua Mezorianta Kunveno lastjare okazis en Amman en Jordanio. Post tiu ĉi sukceso oni decidis okazigi la duan kunvenon en la turkia urbo Iznik ĉe la lago de Iznik sude de Istanbul. *La plej gravaj celoj* de tiaj kunvenoj estas la kuraĝigo kaj interkonatiĝo de samideanoj el la regionaj movadoj, kaj partoprenis esperantistoj el Irano, Israelo kaj Turkio. La aliaj apogantaj partoprenantoj venis el 13 landoj: Belgio, Kroatio, Danio, Francio, Germanio, Nederlando, Italio, Latvio, Pollando, Serbio, Hispanio, Svislando kaj Usono.

La aranĝantoj, i.a. Renato Corsetti, Murat Ozdizdar (Turkio), Can Zamur kaj Tom Juval (Israelo) gastemece prizorgis nin per belegaj ekskursoj en Izniko kaj Bursa (la iama otomana ĉefurbo), interesaj prelegoj kaj viglaj distraĵoj.

La prelegoj temis pri la agado de la movadoj en Irano, Israelo kaj Turkio; en la du unue menciitaj landoj la movadoj jam da multaj jaroj vigle funkcias, kaj la nuntempa movado en Turkio estas nun kreskante. Ĝoje estis, ke turka gejunula grupo kiu ankaŭ partoprenis la kunvenon estis instruitaj dum la kunveno de la ĉeh-metoda instruistino el Serbio Tereza Kapista. Alia kaj aktuala prelego de Ana Lowenstein temis pri geografiaj nomoj. La ekzisto de antaŭjuĝoj pri aliaj popoloj kontribuas je la malpaco en la mondo, tial unu el la plej utilaj

prelegaj temoj estis la prelego de Profesoro Davide Astori el Italio pri eŭropaj antaŭjuĝoj pri turkoj. Esther Schor el Usono gvidis poezio-deklamon de originalaj kaj tradukitaj peomoj de diversaj landoj.

Tiel kiel ofte okazas ĉe Esperantaj aranĝoj oni ĝuis en Izniko amuzajn distraĵojn. La unuan vesperon okazis la interkona vespero, la duan Georgo Handzlik kantis siajn gajajn kantojn kaj la trian vesperon Saša Pilipoviĉ el Begrado prezentis kabaredan spektaklon kaj du el la komencantoj ankaŭ lerte prezentis teatraĵon.

Post la kunveno okazis postkongreseto la 7-an ĝis la 10-a de aprilo en Istanbul. Domaĝe estis, ke ne ĉiuj el la kunvenantoj povis partopreni la postkongreson en Istanbul, ĉar ankaŭ tiu ĉi plenis je memorindaj travivaĵoj. Dum tri tagoj oni eblas viziti ne ĉiujn vidindaĵojn; tamen Murat Ozdizdar kaj Can Zamur lerte ĉiĉeronis nin, ne nur al la kutimaj ejoj, sed ili montris al ni ankaŭ la intereseĝajn kvartalojn de Uskudar kaj Kadikoy en la azia parto de Istanbul, kie okazas la ĉiutaga vivo. Feliĉe mi havis la tempon viziti la Bluan Moskeon, la Aya Sofya Muzeon, la katakombojn, la Topkapi Muzeon, tie kie la sultanoj iam vivis kaj regis la Otomanan Imperion kaj la Grandan Bazaron.

Niaj afablaj kaj gastemaj turkiaj samideanoj, kiuj ĉiam restis je nia dispono dum la restado en Turkio vigle agadas por la kreskado de la landa movado. Ili esperas, ke aliaj esperantistoj pripensos kontakti ilin.

Legu ankaŭ la artikolon pri la kunveno skribita de Renato Corsetti ĉe

<http://www.liberafolio.org/2009/ne-israelanoj-kun-irananoj-sed-esperantistoj-kun-esperantistoj/>



SCIENCAĴOJ

C. R. Darwin /1809-1882/

Pri Charles Robert Darwin la angla naturesploristo ni rememoras, je la 200.a jardatreveno de lia naskiĝjaro. Darwin estis la plej grava figuro de la moderna biologio, kreanto de la moderna deventeorio. Dum sia kvinjara ŝipvojaĝo – sur ferdeko de la Baegle – li vizitis ĉiun regionon de la mondo; interesa pri biologiaj- kaj praestajaj vidpunktoj.

Ĉie li kolektis materialojn de plantoj, bestoj kaj paleontologiaĵoj. Pri sia vojaĝo li raportis en sia libro: „Ĉirkaŭtera vojaĝo de unu naturscienculo.”



En 1859 per sia libro:”Deveno de la Rasoj” li iĝis mondfama.


Liaj verkoj igis lin ne nur mondfama, sed influis ankaŭ la plian evoluon de la biologia scienco. Liaj plej gravaj esplortemoj estis:

- deveno de la rasoj,
- supervivo de la rasoj,
- la naturaj ekskreciiĝprocezoj de la rasoj okaze de sia evoluprocezo,
- ŝanĝiĝo de bestoj kaj kreskaĵoj okaze de siaj domeskiĝ-procezo
- deveno de la homo kaj la seksa- ekskreciiĝo,
- esprimo de la sento ĉe la homo kaj la bestoj.

Liajn verkojn pleje atakis la eklezio. Kontraŭ liaj vidmanieroj elformiĝis la *antidarvinismo*, laŭ kio oni preskaŭ tute forĵetis liajn asertojn koncerne la evolucion. Liajn esplor-rezultojn kaj teoriojn, ekde tiam jam pravigis la esplor-rezultoj de multaj sciencistoj. Je la 200a datreveno de lia naskiĝo kaj je la 150. jardatreveno de eldono de sia libro titolita: 'Deveno de la Rasoj', En la mondo multloke oni rememoras pri Charles Robert Darwin.

Adri Pásztor





Ĉi tie videblas bildoj pri li, krome pri la libro „Vivo de Darwin”. Havanta ĝin la miŝkolca Biblioteko „Francisko Rákóczi II-a”. La bildojn sendis: - sinjorino Katalin Bede: bibliotekistino de la menciita biblioteko.

Adri Pásztor Trafa respondo

Komence de la 20-a jarcento okazis, ke iu knabo, lernanto, demandis al sia patro:

- *“Ĉu pravas, ke ni devenas de la simioj?”*

La patro, surprizite, metis flanken la gazeton. Iomete li pensadis, poste firme respondis.

- *“Mi neniel devenas de simio, sed vi certe jes!”*

La pereiga vaporo

Ni ankoraŭ vidis – konstatis kontente tiuj, kiuj nun hejmenalvenis el Egipto. Nome ili informiĝis en Budapeŝto, ke baldaŭe ne estos viziteblaj la piramidoj kaj reĝtomboj. Egipto ne permesas por iri la scivolaj turistoj al la artobjektoj, kiuj malutilas tiujn. La famo disvastiĝas ĉefe laŭ buŝa tradicio. Ĉu tio estas vera? Kiu konas kaj komprenas Egipton, tiu diras tiun, ke ĉi tio estas nebla!

Eterna dilemo estas, ke kio estas la plej grava: ĉu defendi la memorojn de la pasinto, aŭ montri al multe da generacioj la kreaĵojn de la prauloj. Ĉu ambaŭ ankaŭ la bone edukitaj turistoj faras malutilon, ĉar ili spiradas, ĉar ili estas vivaj homoj? Ĉu ĉi tial pro tio devus fermi la kriptojn?

„Tiuj famoj estas troigaj, kiuj temas pri fermo de la kriptoj. Mi estis en Egipto en la novembro de la pasinta jaro kaj mi ne aŭdis pri fermo.” – diris László Kározy, profesoro, kiu gvidas la esplorfosadojn de la hungara arkeologgrupo en Théba. – „Egipto estas nekredible riĉa je vidindaĵoj, do tio ne eblas, ke la turisto ne rigardu la plej famajn memoraĵojn. Eĉ, preskaŭ po jaro ĉiam pli novajn sensaciajn arkeologiajn trovaĵojn trovas la arkeologoj.”

Ankaŭ la profesoro veturis kiel vizitanto pli lastfoje al Egipto. Li volis por vidi la tn. El oro faritajn mumiojn, kiujn oni trovis en la okcidenta dezerto, en oazo Baharija dum malkovro de iu grandioza romepoka tombejo. Oni ekkonis nur malgrandan parton de la teritorio, sed laŭ la esploristoj multmil mumioj ripozas tie. La profesoro tion spertis, ke en la tomboj daŭriĝas tre

zorgema laboro, oni kreis malgrandan muzeon kaj kelkaj mumioj jam estas videblaj por la publiko.

Alia sensacia esplora teritorio laŭ li la fundo de la maro proksime de Aleksandria / Aleksandria/ -. La profesoro diras tion, ke en la pli lastaj jaroj evoluiĝis la subakviĝista arkeologio kaj evidentiĝis, ke en la maro estas grandiozaj ŝtonblokoj, obeliskoj, sfinksoj, statuoj. Ĉi tiuj ĉefe en ĉirkaŭaĵo de la fama lumturo falis en la maron, aliparte tiuj devenas el tri proksimaj urboj. Pli malfrue ankaŭ ĉi tiuj estos videblaj por turistoj. Estas sendube, ke la vizitantoj dezirus vidi ĉi tiujn vidindaĵojn en natura medio, ĉar la filmo, foto ne donas tiun travivaĵon, kiun signifas la proksimeco de la piramido. Ankaŭ en Egipto oni scias tion, ĉi tial oni klopodas prezenti ĉion al la vizitantoj. La turismo estas ĉefa enspezo, sed la fakuloj atentigas ĉiujn, ke la turismo endanĝerigas la statuojn, la freskojn, la memorlokojn. Ekz. En la Valo de la Reĝoj en la roktomboj ĉiutage multe da homo estas, ili frotadas la muron de la koridoroj. Grandiĝas la vaporenhalo de la aero, la muroj tramalsekiĝas kaj la farbo, mortero komencas forfali. Pro la malsekeco la bakterioj plimultiĝas. Vane estas la atentigo, kio malpermesas la fotografadon per eklumo, palpado de la bildoj, multe da homoj malgraŭ la malpermeso karesas la bildojn. Kvankam Egipto ne malpermesas, sed provas malgrandigi la vizitadon.

Laŭ la profesoro la alta vaporenhalo kaŭzas signifan malutilon, kion li pruvas per unu ekzemplo:

„La tombon de I. Széthi faraono vizitis multe da homoj. Tio estas la plej riĉe ornamita reĝotombo. En la 1980-aj jaroj iu oranĝflava konstelacia belega plafonparto subfalas kaj ĝi pecetiĝis. Feliĉe oni sukcesis rekonstrui ĝin, sed ĝi ne similas tute al ĝia originala stato. Ĉi tial oni devis fermi la tombon kaj malpermesi la vizitadon.

/ El Hungara Bildrevuo esperantigis László Pásztor./

Scienca novaĵo

DEMENCIO DE LA MALSATA CERBO

La malsanon de Alzheimer povas kaŭzi malforta cirkulado de sango en la cerbo kaj ĝia nesufiĉa nutrado. Se ni haltigos produktado de albumino kreatan pro malsufiĉa cirkulado ni ankaŭ haltigos tiun specon de demencio – opiniis esploristoj.

Ju pli malforta estas la cerba sangocirkulado, des malpli la cerbo estas nutrata. Nesufiĉa kvanto da glukozo ka oksigeno komencas ĉenan reakcion kaŭzantan disvolviĝon de la malsano – pruvas usonaj sciencistoj el Feinberg School of Medicine ĉe Northwestern Universitato en Ĉikago. Efikojn de tiuj ĉi epokaj esploroj publikigas la revuo „Neuron”.

Damaĝaj platetoj kaj kunplektaĵoj

Alzheimer malsano estas la plej ofta formo de demencio en maljuna aĝo. Ĉirkaŭ 24 milionoj da homoj estas malsanaj je ĝi. En Pollando estas malsanaj ĉ. 200 mil, sed nur ĉe 10 % estis ĝusta diagnozo.

Monda Organizo pri Sano /WHO/ taksas, ke ĝis la jaro 2020 en la mondo estos jam 42 milionoj da malsanuloj kaj ĝis 2040j. eĉ 81 mln. Tiuj nombroj montras, ke trovo de la malsano kaŭzo estas principo por medicino.

Mekanismo de la malsano estas longe konata. Senpera kaŭzo estas algluado de „maljunecaj platetoj” en arterioj de la cerba ŝelo. Precipe ili troviĝas en la lokaj kontrolantaj konduton, memoron kaj parolon.

La dua karakteriza simptomo de la malsano estas troa arigo de tau albumino en nervaj celoj de de la cerbo. Tiuj albuminaj fibroj kreas plektaĵon gvidantan al morto de neŭronoj.

Kia estas rilato de apopleksio al demencio.

Malfacila estis al sciencistoj konstati, kio estas kaŭzo de neurodegeneraciaj ŝanĝoj. Antaŭdek jaroj d-ro Robert Vassar ĉe Universitato Northwestern en Ĉikago ligis kun la procezo enzimon nomatan BACE 1, kiu aktiviĝas dum manko de oksigeno. La enzimo instigas cerbon al defendo kontraŭ tio. Dum mallonga tempo la defendo estas efika, sed poste amasiĝas la maljunecaj platetoj.

Apopleksio en cerbo povas okazi prro malmulto da oksigeno. Ĝi estas subita haltigo de sangofluo en cerbo.

La disvolviĝo de la malsano estas malrapida, daŭras multajn jarojn, dum kiuj la personoj sentas etajn simptomojn – klarigas d-ro Vassar gvidanta la plej novajn esplorojn.

Post la longa malbonigado de la sangocirkulado en cerbo kolektiĝas pli kaj pli da platetoj en arterioj inter neŭronoj. La cerbo ne ricevas sufiĉan kvanton da glukozo, kiu liveras al ĝi necesan energion.

Malpli da sukero, pli da risiko.

D-ro Vassar pruvis, ke grandan produktadon de BACE 1, en organismo stimulas ŝanĝita albumino / eIF2alfa/ kies damaĝan ŝanĝon kaŭzas malbona, cerba sangocirkulado.

Tio sugestas, ke bonigo de la cirkulado estas profilaktiko, aŭ eĉ kuracado de la malsano.

Ekzercoj, malaltigo de kolesterolo, kontrolo de sangopremo povas protekti kontraŭ Alzheimer malsano. Per frua profilaktiko la homoj povas eviti la malsanon.

La plej simpla kaj rekomendata estas intelekta aktiveco kiel solvado de enigmoj, ludo per ŝakoj kaj movo en freŝa aero.

La sciencistoj sub gvidado de d-ro Vassar konstatis, ke haltigita produktado de la albumino eIF2alfa povas ŝtopi la procezon de cerba degenerado kaj iĝi la unua efika rimedo kontraŭ la malsano.

Ĉe personoj jam malsanaj pro mallarĝigo de arterioj, kuraciloj larĝigantaj ilin povas prokrasti demencion.

Malsano en genoj

Aliajn gravajn sciigojn anoncis la esploristoj el Universitato en Miami en „Amerikan Journal of Human Genetics”. Ili malkovris nekonatajn ĝis nun diferencojn en unuopaj nukleotidoj, etajn ŝanĝojn en DNA, kiuj povas respondi en 50 % pri Alzheimer malsano. Iu el ili troviĝas ĉe la geno kodanta receptoron de D vitamino, ligata kun stato de memoro.

Tiu eltrovo povas helpi en pli bona kompreno de la ĝis nun ne kuracebla malsano.

/Aleksandra Stanisławska. „Rzeczpospolita”, Tradukis Danuta Kowalska/Aperis en la revuo Pola Esperantisto, n-ro 1/2009. Aperigo permesitata de s-rino Halina Komar/

Dua Renkontig'o

Tuj antau' UK (verdire survoje al UK) la 22-24an de julio okazos la Dua Renkontig'o de Universitataj Instruistoj, kadre de ILEI konferenco en Krakovo, kie ni havas eblon kontroli atingojn post pasintjara renkontig'o en Amsterdamo, diskuti pli kaj fari novajn planojn, decidi c'u havi similajn renkontig'ojn regule (ne nepre c'ujare).

Estas proponataj du laborgrupoj: pri interuniversitataj inters'ang'oj, kiun gvidos Kristin Tytgat el Bruselo (gvidanto de Erasmus buroo en Erasmushogeschool) kaj pri programoj, kiun gvidos Ilona Koutny el Poznan (gvidanto de Interlingvistikaj Studoj de UAM). Formala gvidanto de la renkontig'o estos Renato Corsetti el Italio (psikolingvisto el Roma universitato La Sapienza).

Krom laborkunsidoj kaj aliaj fakaj konferencaj programeroj ni proponas:

- bankedon kaj konferencan balon
- c'iuvespran kulturan kaj distran programon
- ekskursojn (Wielic'ka, Niepolomice, Krakovo, Zakopane, Vadovice-Kalvaria-Aus'vico)
- ec' Nokton de Lingvoj kaj Kulturoj kun pluraj interesaj programeroj
- koncertoj de famaj kaj s'atata e-kantistoj. Ekz: JoMo (li planas kanti en 25 lingvoj - Guinness rekordo jam atingita en 2008, restas eblo nur g'ui kaj kunkanti), Amir (Espero Despero) k. t. p.

Venu por partopreni la Universitatan Renkontig'on, venu kaj kunlaboru ankau' kun E-instruistoj, kiuj celas enfokusigi du komplementajn taskojn: edukadon al Esperanto kaj edukadon per Esperanto.

Tamen, pli bone venu por tuta konferenca semajno, g'uu estoson, kuneston, programon c'ar:

ILEI - KONFERENCO - AMBAŬ: AMUZO KAJ SCIENCO!

Pli pri la Renkontiĝo en http://ilei.info/konferenco/alvoko_Krakovo_9.jpg

Informoj pri la konferenco, ĝia programo, urbo, partoprenkondiĉoj en
<http://www.ilei.info/agado/Krakovo.php>

Reta aliĝilo en <http://ilei.info/konferenco/alighilo2009.php> Vi ĉiam estas bonvena skribi al:

Małgosia J. Komarnicka margareta.ilei.pollando@gmail.com — ĉefa loka organizanto,
Radojica Petrović rade@ikso.net — prezidanto de ILEI, Sjoerd Bosga sjoerd@esperanto.se
— kasisto de ILEI.

Organizantoj

Małgorzata J. Komarnicka
Sekretario de ILEI-Pollando
<http://www.ilei.pl>

Renato Corsetti

Novaj ekzamensistemoj de UEA

Informoj pri la printempa kaj someraj sesioj de la nova ekzamensistemo de UEA

Ni infomas vin ke en la sekvaj monatoj okazos pluraj sesioj de la novtipa ekzamensistemo de UEA-ITK. La plej proksimaj datoj estas:

dum la **Eŭropa Kongreso en HERZBERG** (Germanio la 30a de majo),
dum la **TEJO-kongreso** (Ĉeĥio, 20-21a de julio) kaj
dum **UK en Bialistoko** (30a de julio,).

La kompletan liston, datojn kaj la okazigotajn nivelojn de la ekzamenoj bv. kontroli en la [tabelo de la sesioj](#).

Se vi estas interesata ekzameniĝi, bv kontakti la indikitajn personojn kaj peti aliĝformularon kiel eble plej frue.

La ekzamenoj estas ellaboritaj laŭ la Eŭropa Referenckadro je tri niveloj (B1, B2 kaj C1).

La du partoj (skriba kaj buŝa) de la ekzameno fareblas ankaŭ aparte, en diversaj lokoj kaj periodoj kaj pri ili riceveblas apartaj atestiloj.

Por la interesuloj ni aparte konsilas mendi la eldonaĵon [Esperanto de nivelo al nivelo](#), kiu entenas ĉiujn necesajn informojn kaj seriojn de specimenoj je ĉiu nivelo de la ekzamensistemo.

Ni esperas, ke multaj samideanoj volas testi siajn konojn laŭ la eŭropaj normoj kaj akiros la prestiĝan atestilon.

Sukcesan prepariĝon deziras al vi:

Katalin Kovats, respondeculo de la novtipaj ekzamenoj de UEA

Ni funebras

Forpasis KURISU Kei, Honora Membro de UEA

KURISU Kei, Honora Membro de UEA, forpasis la 18-an de aprilo. Li naskiĝis la 18-an de julio 1910. Esperanton li lernis en 1930, opiniante ke per tiu lingvo eblos progresigi komunismon, je kiu li kredis. Li aktivis en Japana Proleta Esperantista Unio kaj kunredaktis la kulturajn revuojn "Marŝu" kaj "Majo" (1935/36). Pro sia politika agado li pasigis entute kvar jarojn en malliberejo. Antaŭ kaj precipe post la milito li uzis Esperanton por ampleksa korespondado kun eŭropaj kaj ĉinaj esperantistoj. Jam ne plu komunisto, li dum la kvindekaj jaroj iĝis respektata specialisto pri Ĉeĥoslovakio en sia lando. Li japanigis multajn ĉeĥajn ĉefverkojn, i.a. "La brava soldato Ŝvejk" de J. Hašek kaj "Milito kontraŭ salamandroj" de K. Čapek. De 1959 ĝis 1961 li estis en Prago universitata lektoro pri la japana lingvo. Kurisu tradukis japanen ankaŭ el Esperanto: "La danĝera lingvo" de U. Lins (1975) kaj "Tempesto super Akonkagvo" de T. Sekelj (kun sia filo Akane, 1990). En 1979 li iniciatis la fondon de Societo por Japana-Ĉina Amikeco per Korespondado, kiun li mem prezidis. Li verkis japanlingve tre multajn artikolojn en japanaj periodaĵoj pri diversaj temoj, laste ankaŭ pri sia vivo, en kiu tiom rolis la fruktoj de Esperanta korespondado. En 1991 li iĝis Honora

Membro de UEA. 85-jara li debutis kiel Esperanto-verkisto, gajnante per eseo en la Belartaj Konkursoj de UEA la Premion Luigi Minnaja. Dum la 92-a UK en Jokohamo (2007) li kaptis la atenton de ĉiuj kongresanoj per vigla parolado, en kiu li alvokis, ke la esperantistoj pli multe subtenu la Esperantan literaturon.

/Laŭ s-ro Osmo Buller; ĝenerala direktoro de UEA - Ferenc Harnyos, vicprezidanto de HEA/

Forpasis D-ro Hejdar Raŝidi

Kun granda malĝojo mi informiĝis ke D-ro Hejdar Raŝidi, pionira afgana esperantisto forpasis en Torbat-Gxam, Irano. Li estis kuracisto (radiologo) kaj ekde 1979 loĝis en Irano. Li verkis persan memlernolibron. Aperis intervjuo kun li en 'Esperanto' antaŭ kelkaj jaroj. Mi kontaktis por surprizigi lin pri la apero de 'Versoj de Persoj' (kolekto de originalaj esperantaj poemoj de iranaj esperantistoj) sed mi informiĝis pri lia forpaso. Estu trankvila lia animo. Jen lia bela poemo kiu aperis en la libro:

PANJO...

Kiam mi vidis vian fantomon
Tre rapide batis mia koro.
Mi volas kisadi vian manon
Ĉar mi amas vin kiel amanto.
Kion deziras vi kara mia
Ordonu al mi, mi faros ĉion.

Keyhan Sayadpour / Ferenc Harnyos

TIBOR SEKELJ

TEMUĜINO, LA FILO DE LA STEPO

Tradukis Terezija Kapista

La titolo de la originalo TEMUDŽIN – DEČAK STEPE

Eržebet Sekelj, Subotica

Lektoris, la poemojn tradukis kaj la titolpaĝon desegnis: Marko Petroviĉ

Ilustris: Hunor Ĝurkoviĉ

Kompostis: Dimitrije Janiĉiĉ

Eldonisto TEREZIJA KAPISTA

Novi Beograd

Studentska 39/23

Jugoslavio

1993.

Presis: SZR sava Todorov, Dubrovaĉka 3 Beogrado

La triopa alianco estiĝas nevenkebla

La flaviĝintaj folioj de „Ruĝa Kroniko” daŭre parolas pri la triopa alianco inter Temuĝino, Toril-hano kaj Ĝamuko. Tiel unuiĝintaj ili ekestis nevenkeblaj, kontraŭstare al nehomogenaj klanoj de mongolaj stepoj.

La unua komuna entrepreno de triopa alianco estis militiro kontraŭ Tajĉiutoj: kun intenco el tiu medio forpeli ilian klanon, kiu jam dufoje atakis kontraŭ la familio de Temuĝin por ĉese neniigi ilin.

La aliancoj decidis ataki Tajĉiutojn eksterni ĝin dum vespero, kiam ili estas malplej pretaj sindefende.

- Eble tiel eĉ ne okazos vera batalo - diris Temuĝin - Ni evitos murdadon, se ne estos necese.

La aliancanoj kun siaj homoj ĉirkaŭis la bivakon de Tajĉiutoj, nur du flankoj por donu al ili eblecon eskapi. Aŭdinte batakriadon el malproksimo, Tajĉiutoj haste preparis sin por fuĝo. Ili eĉ sukcesis siajn tendojn sur ĉarojn ŝarĝi kaj tiel fuĝis al direkto, kiun la atakintoj lasis malfermitan.

La atakantoj persekutis ilin, sed ne kun intenco mortigi aŭ kapti ilin, sed nur por simple forpeli ilin plej foren el tiu regiono.

Sed Temuĝin krom ĉiu milita celo portis en si ankaŭ nun sekretan intencon, pri kiu al neniuj parolis. Li sciis, verdire, ke lia edzino, Borte ĉe Tajĉiutoj estas de tiu tago, kiam ili kaptis ŝin. Li sciis, ke ŝi estas kun tiuj fuĝantoj, sed kiel trovi ŝin en tiu paniko?

Temuĝin per sia ĉevalo kuregis antaŭan ĝis unuaj fuĝantoj, haltis proksime al la vojo, laŭ kiu la Tajĉiutoj fuĝis kaj ekkriegis el plena gorĝo: „Borte, kie vi estas?” Borte, respondu!”

Kaj preskaŭ miraklo okazis, la juna virino aŭdis sian nomon kaj rekonis la voĉon de sia edzo. Baldaŭ ŝi ekvidis lian silueton, kiun konturis la fono de l’ stelplena ĉielo. Dum ŝi kuris al li renkonten li ankaŭ eksaltis de sur la ĉevalo kaj ĵetis sin en la reciprokan ĉirkaŭbrakon.

La fuĝantoj tion eĉ ne rimarkis, tiom ili estis okupitaj pri sia malbono kaj panike fuĝis.

Temuĝin por Borte tuj trovis rezervan ĉevalan kaj de tiam ŝi rajdis apud li dum la tuta nokto ĝis decido de aliancoj rezigni de la pluan peladon. Ili nur sekvigis al ili kurieron kun admono, ke neniam plu revenu al tiu ĉi regiono, ĉar tiam ili estos perforte forpelitaj kun eble pli granda perdo ol nun.

Estas realigita la espero de Temuĝin. Iamaj servistoj de lia pastro, ankaŭ la parencoj iam kun ili vivantaj revenis kaj starigis siajn jurtojn proksime al Temuĝin. Tiel disvastiĝis la famo pri sukcesoj de Temuĝin, ke ankaŭ aliaj, pli malproksimaj parencoj, eĉ tutaj etkloroj alvenadis por proponi al li aliancon. Tiel la klando de Temuĝin estiĝis granda kaj forta, samkiel la klandoj de liaj aliancoj.

- Se via patro povus vidi vin, - diris la patrino de Temuĝin, kiu multon trasuferis kun li – li estus fiera pro sia potenca filo.

La aliancoj poste iris renkonten al aliaj klandoj kaj triboj, kelkajn el ili sukcesinte persvadi por unuiĝo. Ili estis impresitaj pri Temuĝin pruvinte al ili celon de unueco, precipe kiam li kun grandkredo mesaĝis sian ideon: „Se ni ĉiuj Mongoloj unuiĝus, la tuta mondo povus esti ni!”

Kiu scias, ĉu li mem kredis je la vortojn, kiujn li elparolis. Sed gravas, ke la aliaj ekkredis tion sen troa cerbumado kaj aliĝis al triba alianco. Tiom sugesto povon enhavis la vortoj de junulo, ke ankaŭ li mem komencis iom post iom esti konscia pri tio.

Sed la aliaj, nekutimintaj unuiĝi, sed batalintajn batalojn kaj malamikecojn rezistis. Kontraŭ ili la aliancoj entreprenis militiron kaj perforte devigis ilin alianciĝi.

Tiel, pli kaj pli kreskis la mongola soldataro, kiun timis eĉ la plej malproksimaj triboj en tiuj vastaj mongolaj stepoj.

Dum plenaj du jaroj la triopo ĉie sekvis unu la alian kaj iliaj familioj starigis jurtojn en proksimeco. Al ĉiuj ŝajnis, ke la alianco estas nerompebla.

Tiam iun tagon Ĝamuka diris la Temuĝin, sia ĵurfrato:

- Starigu niajn jurtojn proksime al la montaro, por ke niaj paŝtistoj, kiuj paŝtas la
- brutarojn en montaro, povu pli facile subiri al ni. Ni starigu la bivakon proksime al rivereto, por ke niaj ŝafistoj povu pli facile akiri la nutraĵon.

Temuĝin ne komprenis la signifon de ĵurfrataj vortoj kaj profunde ekmeditis. Al kiu stranga loko ili ja deziras reloki siajn jurtojn?

Post longa cerbumado li iris al la jurto, kie la virinoj kunvenis pro iu komuna laboro. Li rakontis al ili, kion proponis lia ĵurfrato kaj konsultis ilian opinion.

La virinoj sentis, ke la vortoj de Ĝamuko havas iun sekretan signifon, sed eĉ ne unu kuraĝis ion diri konkretan. Tiam Borte ekparolis:

- Nu, se neniu el vi scias la signifon de tiuj vortoj, vi aŭdu min: Via ĵurfrato jam delonge ne simpatias nin kaj nun venis la tempo, kiam ni eĉ ĝenas lin. En liaj vortoj estas kaŝitaj ĝuste tiuj sentoj. Estus la plej bone, ke ni dumnokte kunprenus niajn tendojn kaj iru for de ĉi tie. Tiel Ĝamuko pli facile regos super montaraj gentoj kaj li plifacile akiros nutraĵon por siaj homoj, ĉar ili restos tiam malplimultaj.

La aliaj virinoj akceptis tiun klarigon. Ili jam rimarkis, ke Ĝamuko estus pli feliĉa for de Temuĝin, kiu iamaniere ĵetas ombbron sur lian bravecon.

Temuĝin akceptis la konsilojn de la virinoj. Sed, antaŭ ol findecidi, li vokis alian sian aliancanon, Toril-hanon. Li prezentis la proponon de Ĝamuka kaj klarigon de Borte. Post ioma cerbumado ili konsentis kun propono de Temuĝin kaj akceptis lian inviton al komuna foriro.

Tiel, dum nokte, la plej parto de bivako estis levita, ĉiuj ĉaroj estis ŝarĝitaj per jurtoj, ĉevaloj estis seligitaj plej senbrue. Ili foriris tiom silente, ke tion rimarkis neniu el homoj de Ĝamuka kaj nalplej Ĝamuka mem.

Estas vero, ke li lasta tempe montris la signojn de ĵaluzo rilate al Temuĝin kaj strebon estigi la sola mastro de la tuta grupo. Sed ĉu li – per sia propono – deziris diri ĝuste tion, kion klarigis Borte, tio neniam estos pruvebla.

Post kelktaga serĉado de konvena loko por jurtejo, avangardo proponis starigi la jurtojn sur vasta altebenaĵo, kun milda deklivo kaj taŭga paŝtejo por ĉevalo, mem subpiede al montareta regiono. Tie proksimis alflurivero de Selenga kun freŝa pura akvo kun abundo da fiŝoj, kiel ili poste povis konstati.

Temuĝin cerbumis: „Jen, ĝusta loko, kian proponis mia ĵurfrato. Ĉu li ne diris laŭvorte, tion pri kio li pensis?”

Dum iu tempo li sentis konscienciproĉon, ĉar li ne deziris esti maljusta al amiko. Sed tiu penso rapide fforlasis lin, ĉar aliaj, novaj ideoj eklegis lian spiriton. Li devis plu iri por realigi aliajn, pli altajn celojn.

Du aliancanoj decidis entrepreni konkermiliton kontraŭ la Tataroj, ĉar ili ne akceptis esti amikoj kaj ambaŭ flanke rehelpadi al soldataro de Temuĝin kaj Toril-ĥano.

Temuĝin apenaŭ atendis tion. Li havis kun ili aankaŭ la personan finkalkulon. Li sentis kiel la devon venĝi la murdon de sia patro Jusigejo, kiun ĝuste la Tataroj venenigis, kiam li trairis ilian landon. Kaj la venĝo estis ebla nur per milito, sed neniel per amikeco, aŭ alianco.

La unuĝintaj mongolaj gentoj sub komuna estrado de juna kaj arda Temuĝin kaj pli aĝa, sperta Toril-ĥano konsistigis la soldataron, kiun la Tataroj ne povis kontraŭstari.

La soldataro tranoktis een iu valo, proksime al tatara bivako kaj dum la mateniĝo, antaŭ sunleviĝo komencis atako. Parto de atakantoj faris la sieĝon kaj kun sturmekriado faris grandan embarason inter Tataroj, kiu baldaŭ kulminis al paniko.

La dua parto de la soldataro transiris al la rekta atako, frakasinte ĉiun baron sur ilia vojo.

Rifuzinte akcepti aliancon la Tataroj atendis atakon, se dili ne konjektis, ke tio okazos tiom rapide kaj ŝtorme. La gardistoj een kelkaj lokoj ĉirkaŭaj ankoraŭ trankvile dormis kaj inter ili la Mongoloj povis facile penetri.

La batalkolizio daŭris kvar tagojn. La Tataroj rezistis esperinte helpon de aliaj tataraj triboj. Sed inter ili la malkonkordo estis samforta kiel inter Mongoloj kaj neniu tribo rapidis helpi. Finfine la atakitaj triboj kapitulacis, sed kiam la batalkampoj jam estis plena de kadavroj kaj la jurtoj preskaŭ ĉiuj estis forbruligitaj.

Mizere akceptis eĉ persona la Tatara-ĥano mem, kiam li kun du siaj helpantoj, alvenis transdoni siajn glavojn al Toril-ĥano kaj Temuĝin, kiuel simbolon de sia kapitulacio.

Temuĝin taksis, ke la morto de lia patro estas digne venĝite kaj li sufiĉe humiligis tiujn fierajn mastrojn de la stepo. Pro tio li ordonis, ke oni nenian plu minacu kaj lasu Tatarojn ordigi sin kiom eblas por ke ili daŭrigu normalan vivon.

Kiam aliaj tataraj triboj aŭdis pri tiu malvenko de siaj fratoj, ili sendis siajn kurierojn al bivako de venkintoj kun oferto de amikeco kaj humiliĝo sub ilia regado.

La aliancanoj tion nature akceptis kun ĝojo, ĉar nun ilia regado etendis sin super ĉiuj mongolaj kaj tataraj triboj, kiu signifis ne nur vastegan teritorion, sed ankaŭ potencon soldataron. Tio fortan, ke la historio ne memoras al ĝi egalan en Azio.

La potenca militestro aperas

En tiu tempo okazis, ke la filo de Toril-ĥano estiĝis ĵaluza kontraŭ Temuĝin. Ili estis samaĝuloj, sed dum Temuĝin kolektis la tribojn kaj submetis ilin al sia estrado, akumulante la potencon de tago al tago, li, la filo de ĥano ankoraŭ knabece nur sekvis la paŝojn de sia patro kaj restis nekonata.

Persvadis sian patron ion entrepreni kontraŭ Temuĝin por elimini lin, ĉar li estas nesincera kaj profitanta ilin por estiĝi supera.

Li tiom ege kolumniis Temuĝinon antaŭ sia patro, ke la ĥano komencis ekkredi la danĝeron, kiu minacas lin de Temuĝin. Li decidis ion entrepreni kontraŭ li.

Toril-ĥano konanta aŭdacon de sia alianco, estis konscia, ke la konflikto inter ili povus esti longdaŭra kaj tre danĝera por li kaj lia tuta familio. Pro tio li decidis peti helpon de ilia iam komuna aliancano Ĝamuko.

Ĝamuko akceptis la inviton kaj translokiĝis kun siaj homoj en proksimon de Toril-ĥano, por ke ili povu pli facile konsenti, kiam kaj kiel estas plej oportune ataki sian danĝeran rivalon.

Sed tiu rivalo montriĝis pli danĝera ol ili povis konjekti: Li estis ne nur aŭdaca militestro, sed ankaŭ sperta kaj ruzega diplomato. Eksciinte kion preparas la eksaliancoj kontraŭ li, li sendis la fidindajn homojn al iliaj bivakoj, ke ili lanĉu la informon kvazaŭ nek por Toril-ĥano, nek por Ĝamuko estas fidinda tiu alianco, ĉar ambaŭ ili nur deziras misuzi la aliancon por post la venko super Temuĝin elimini ankaŭ la alian por mem kapti la tutan potencon.

Semo de l' malfido estis ĵetita en la fekundan grundon. Mongoloj ĉiam estis la viktimoj de tiaj perfidoj kaj trompaĵoj, interrilataj atakoj kun amikaj kaj aliancanoj. Tiel kaj Ĝamuko kaj Toril-ĥano facilanime ekkredis, ke la alianco dezirus trompi lin.

Kiam, pere de siaj spionoj Temuĝin taksis, ke la malkonkordo inter aliancanoj jam estas sufiĉe grava, ke la malefiko super regis ilin, kun sia soldataro li unue sieĝis Ĝamukon kaj devigis lin al obeemo, poste la saman manovron aplikis kontraŭ Toril-ĥano. Persone enirante lian jurton por senarmigi la ĥanon, ne preterlasinte okazon por riproĉi kaj humiligi lin.

- Ni ĵuris unu la alia fidelecon kaj nun vi komplotis kun alia por elimini min. Hontu, Toril-ĥano! Se mi ne estus bone memoranta vian helpon en la tempo, kiam mi estis sola kaj malforta mi povus alimetode trakti vin kaj vian gloravidan filon. Nun, kion mi nun diru al vi? Retenu tiun ĉi glavon kaj gvidu plu vian popolon, sed nur tiel kiel mi ordonos al vi! Sed estu tre singarda ne plu ekpensu ribeli kontraŭ mi, ĉar vi tion ne travivos.

La sperta militestro akceptis tiun malvenkon ankaŭ pro dankemo, ke Temuĝin lasis lin viva kaj ĵuris, ke de nun li batalos nur favore al Temuĝin.

Per tio sub la estreco de Temuĝin troviĝis ne nur la plej multo da mongolaj triboj, sed ankaŭ Tataroj, kereitoj kaj Merkitoj, ĉiuj ĉi popoloj vivis en vasta teritorio de mongolaj stepoj.

Ĝamuko sukcesis nerimarkite eskapi el sia jurto. Li serĉis la genton de Najmanoj kaj ĉe ili komencis komploti kontraŭ Temuĝin kaj ankaŭ helpe de Ongutokoj. Ĵus eksciante tion, Temuĝin ne atendis, ke ili venu ataki lin. Male laŭ sia kutimo, li raŭide reagis kaj antaŭ ol ili sukcesdos finkomploti, li sukcesis per konvenaj promesoj korupti la Ongutokojn, kun kiuj poste li kune atakis Najmanojn kaj superregis ilin.

Al la periferiaj memstraraj etpopoloj – kiaj estas Kirgizoj kaj merkitaj grupoj – restis nenio alia ol direkti siajn senditojn al Temuĝin por deklari humilecon.

La jaroj pasis. Preter tiuj bataloj kaj politikaj manovroj, en kiuj Temuĝin estis implikita, la paŝtistoj plu gvidis sian brutaron al riĉaj montaraj paŝtejoj, dum sufokaj someroj kaj malsupren venis kun ili al ebenaĵoj, dumvintre. La vivo de nomadoj iris laŭ kutima vojo.

Iun tagon aŭdiĝis, ke oni kunvokis „Grandan Kuriltaj”-on, deputitaron de mongolaj feŭdaj nobeloj por la elekto de ĉefĥano, kiun ĉiuj mongolaj triboj kaj la aliancanoj devos obei.

La Granda Kuriltajo kunvenis. Kaj tiam jam estis tute nature, ke la nobeloj elektis homon, kiu jam praktike regis ĉiujn tribojn kaj kiu per sia heroeco kaj spiriteco elvokis admiron de ĉiuj popoloj, loĝantaj en aziaj stepoj. Tiu estis Temuĝin. Kiel la estro de ĉiuj Mongoloj oni donis al li titolon Granda ĥano, aŭ Ĝenĝis-ĥano / Ĝingis-ĥano./

Sub tiu nomo li eniris la historion.

Kiam Ĝenĝis-ĥano akceptis la titolon kaj la devon, li mesaĝis mallonge:

- Nobeloj kaj militestroj, estroj de triboj kaj klanoj, aŭskultu min! Se vi jam elektis min mi estos via Granda ĥano! Sed sub unu kondiĉo: ke ni ĉiam ĉiukaze estu solidaraj, ĉar memoru tion, kiam ni ĉiuj Mongoloj unuiĝos...la tuta mondo povos esti nia!

Tio okazis en jaro 1206, en la kvindekunua vivjaro de homo, kiu, jen tiel, el persekutata kaj turmentata knabo Temuĝin estiĝis granda mastro de mongolaj stepoj kaj popoloj. Sed tio estas nur la komenco de l' rakonto.

En sekvontaj jaroj li donis la ŝtatordon kaj la leĝojn al la nomada popolo.

Li organizis armeon taĉmente kaj regimentek aj kun ili ekiris al konkerajn invadojn submetante aal sia potenco preskaŭ tutan Azion kaj duonon de Eŭropo.

En tiuj invadoj naskiĝis la plej granda imperio, kiun la historio konas: de la Ĉina ĝis Adriatika maroj.

* * * *

La suno jam delonge malleviĝis malantaŭ de ruinoj de malnova Karakorum, la iama tronurbo de Ĝenĝis-ĥano, kies muregojn oni povas vidi el interno de monakejo Erdeni-dzu.

La monakoj jam delonge foriris dormi kaj ankaŭ la petrolo ekmankas en lampo. La rakonto el „Sekreta Historio de Mongoloj” devas esti daŭrigota alian fojon.

La lamao-bibliotekisto, envolvita per malhelruĝa lanŝtofa mantelo gvidis min al unu el monakaj ĉeloj, kun modesta lito el fero. Per la senvorta kapkliniĝo li deziris al mi bonan nokton kaj lasis min solan, en mallumo.

Sed momenton poste, kiam miaj okuloj iom adaptiĝis al la mallumo, mi ekvidis etan fenestron. Mi klinis mian vizaĝon en tiun aperturon.

Antaŭ mi montriĝis la ĉielo kun miloj da tremantaj lampiroj kaj sub ili la senfina stepo surkreskita per herboj.

Ĝi estis la stepo, en kiu kreiĝis la plurjarcenta historio.

Tio estis la stepo de Temuĝin.

Per aperigpermeso de la eldonanto; Tereza Kapista- 2008.





NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Tel.: +36 46 738 982

Retpošto: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>